Tango de la Amo

(Cet air de Tango)

(il tango dell'amore)

paroloj : Lorenzo Tomezzoli
muziko : Gilbert Drigon

1
Ĝi estas vera tango , kiu dance
Luladis niajn korojn cirkonstance
De nia renkontiĝo dum vespero
Plenplena je tener' kaj je mistero
Ni kune estis junaj, senpripensaj
Kun ritmo de korbatoj tre intensaj
Dum magieca nokt'
En tiu romantika lok'
Ĝi estas jam
La tango de la am'
R
Aŭdiĝu tiu kant'
Ĝi estas ja
La tango de la amo
Mi sentas en ĝi nun
La ĝojon tra
La varmo de la flamo
Ĝi brulas en la kor'
De mi kaj vi
Jam de la renkontiĝo
Kaj por ni du,
Jen mirindaĵo
En forta, bela harmonio
Gustumi per
Tre milda kanto
La daŭron de tenera sent"

2
Alvenis vi el lando malproksima,
Al-logis min deziro simplanima
Revivi la etoson plej juvelan
Paroli nian lingvon ege belan
Ja Esperanto taŭgas por kulturo
Aperas ĝi pli riĉa ol naturo
Sed por ni estis ĝi
Ŝanciga, vere pli kaj pli
Ĝi estas jam
La tango de la am'
R
(instrumente)

3
La tempo flugis jam dum la juneco
Pludaŭris en l'animo kun l' ebleco
Ricevi ĉiutage rememoron
Kaj ree loki ĝin en nian koron...
Ĉar tangon dancis ni en la vespero
En kiu verda stelo sur la tero
Alportis tuj al mi
La ĝojon vivi nur kun vi
Ĝi brilas por
La tango de la am'
R
Aùdiĝu tiu kant'
Ĝi estas ja
La tango de la amo
Mi sentas en ĝi nun
La ĝojon tra
La varmo de la flamo
Ĝi brulas en la kor'
De mi kaj vi
Jam de la renkontiĝo
Kaj por ni du,
Jen mirindaĵo
En forta, bela harmonio
Gustumi per
Tre milda kanto
La daŭron de tenera sent'